Unë, Jacques Jacobus Tuinder kam lindur më 10.01.1933 në Hagë, në një familje me dhjetë fëmijë. Prindërit e mij kanë qenë shoqërisht aktivë dhe në punë, ndonëse të varfër. Kur isha 16 vjeç, unë mësova Esperanton, pa të cilën dhe pa lëvizjen mbarëbotërore të saj nuk do ta përfytyroja jetën dhe lumturinë time (me anë të Esperantos unë gjeta edhe bashkëshorten time në Kongresin jubilar të saj në Varshavë). Kam studjuar për filozofi dhe teologji dhe më pas kam kryer Akademinë Sociale sepse doja të shërbeja profesionalisht si ndihmës social. (kam punuar kryesisht në shtëpira, burgje dhe spitale). Jam martuar në vitin 1961 dhe kam dy djem që kanë krijuar familjet e veta. Ndjem njeri i bekuar dhe i privilegjuar. Që nga viti 1966, përpiqem, së bashku me esperantistë dhe joesperantistë, të luftoj kundër paaftësisë së shmangëshme të të parit, me shpenzimet e mia dhe në kohën e lirë.

Me respekt Jacques Tuinder
Henegowenlaan 35, RH 1966 Heemskerk Nederland
Tel 0031251231941
E-mail vera.jacques@casema.nl

Në se ajo Ministri dëshiron të dhëna të tjera, ne mund t’ja kërkojmë ato zotit Jacques Tuinder.

Mendoj se institucionet shqiptare të sipërpërmënduar, sipas kërkesës suaj, mund të konfirmojnë ndihmën që fondacioni EVIDENTE ka dhënë për ta. Ne si Institut kemi shërbyer kryesisht si përkthyes, shoqërues dhe mësimdhënës të Esperantos vite me rradhë në Institutin e Fëmijëve me Shikim të Kufizuar në Tiranë, me të cilin institut i vazhdojmë ende lidhjet.

**Me shumë respekt
Bardhyl Selimi
Sekretar i Institutit**

Reagoj

- Kara Bardhyl,

Jen miaj pensoj pri la propono de Sro Tuinder ordeni sian organizon EVIDENTE:

En Albania kaj la plejmultaj landoj shajnas esti normale ordeni, speciale honori kaj festi elstaraj homoj pro iliaj servoj al la homaro.

Lau bahaa vidpunkto ni loghas surtere por helpi kaj servi unu la alian, char ni chiuj estas servantoj de Dio. Chi-tie en la mondcentro mi legas, audas kaj vidas ekzemplojn de granda memofero flanke de individuoj au grupoj de bahaanoj en chiuj kampoj de socia au sociala evoluhelpe en la tuta mondo, kies rekompenso estas la diaj benoj akompanante tia agado.

Mi deziras chion bonan al vi kaj sukceson en via senlaca laboro por nia kara lingvo.

Elkore salutas

Martha Otto

- Profesor Bardhyl, te them te drejten ngele me goje hapur kur lexova te gjitha veprimtarite qe kishte bere zoti Jacob ne mos gabohem ne emertim te emrit. Mendoj se ky fondacion ja vlen te vazhdoje me tej, te ndihmoje ata qe kane nevoje.

Me respekte **Klotilda Rama**.

- Bardhyl, jam dakord qe shoqates hollandeze “EVIDENTE” te kryesuar nga z. Jacques Tuinder t’i jepet dekorimi sepse ata e meritojne shume, ky eshte mendimi im.

Pershendetje **Nehat Sokli**

Pozitivan reagon jam donis ankaŭ gesamideanoj Rita Permeti, Shaban Hasani, Vasil Pistoli, Gjergji Gusho.

Rememoraĵoj


Vizito de Osman Kazazi en Nederlando

(Ĉerpita de DIA REGNO jaro 1998, paĝo 8)

..La 5-an de junio pasinta alteriĝis en nia flughaveno la plej prave honorita civitano de Albanio: sinjoro Osman Kazazi. Niaj plej fidelaj geamikoj scias, ke ĝuste antaŭ du jaroj li estis en nia hejmo. Tiam li- kiel sola reprezentanto de sia patrujo- partoprenis Internacian Kongreson por Viktimoj de Milito kaj perforto en bruselo. La kialo de lia ĉi-foja vizito estis: duobla kataraktoperacio. Dank’al senlacaj klopodoj de mia amiko- optikisto paul Luyf ni sukcesis trovi nederlandan okulison preta servi al ti “albana Mandela”. Kun vera ĝojo mi povas sciigi al vi ke la operacio, kiu daŭris 2.5 horojn, bonege sukcesis. Tio estas des pli mirakla, ĉar temas pri homo 80 –jaraĝa, kiu dum la plej granda parto de sia vivo vivis vivonpanakvan. Kaj tiun periodon de preskaŭ 46 jaroj li ofte dividis sian minimumon da pano inter kunkaptitoj. Osman kazazi kaj lia kuzo Shpëtim tre dankas al ĉiuj, kiuj ebligis ĉi tiun miraklon. Imagu, ke ni rifuzus helpi al noblega homo, kiu klarekaj akre kaj kvazaŭ profete vidadism kiam la fere stalinisma Albanio troviĝis en

nplej profunda mallumo! La 12-an de junio plurkapa nederlanda delegacio akompanis la altajn gastojn al la Amsterdama flughaveno.

Por nia modesta organizaĵo Osman estas, por tiel diri, “niaj okuloj en Albanio”. Li estas atestanto kaj stimulantulo de niaj projektoj en tiu lando, kiu nomiĝas la “malriĉulejo” de Eŭropo”.



La dua dekstre s-ro Osman Kazazi, jam forpasinta, dekstre s-ro Paul Luyf eminenta optikisto, la dua maldekstre s-ro Jacques Tuinder.

Li ade akompanas nin al blindulejo, surdulejo, orfejo, maljunulejoj kaj instancoj. Li scias, ke ni jam dum jaroj aktivis sub la tegmento de la ĉefurba Instituto por Gelernantoj Nevidipovaj. Li scias, ke ni helpis al la infanoj per ŝuoj, muzikinstrumentoj, nova sistemo de hejtado, tute moderna brajlopresejo, ktp. La venontan monaton ni komencos la duan fazon de rekonstruaj laboroj. Temos pri projekto ĉirkaŭ 25 000 usonaj dolaroj. Nun ĉiu infano havas isan propran muzikilon, sed mankas ejo por ludi..Nu, post kelke da monatoj ili havos sian “konservatorion”, kiel ili majeste titolas tiun ejon por ekzerci kaj prezenti

muzikon. Se niaj geamikoj pli diligente helpos al nia afero..Nu, la plano ekzistas kromkonstrui sur la ekzistanta konstruaĵo kvar klasĉambrojn por post-elementa instruado.
Jacques Tuinder

ILEI kaj NI

Labor-plana punkto:

* UEA kaj ILEI starigu programon de instruista trejnado, kiel esencan elementon de la starigata komuna ekzamena branc'o "Instrukapablo", klopodante enkadrigi elementojn de tiu trejnado en la strukturojn de oficialaj edukaj instancoj kaj helpi al provoj konstantigi au' malfermi oficialajn universitatajn kursojn.
La apero de c'i tiu teksto lau' mi esence kontribuas al trejnado de niaj instruistoj kaj instruantoj.

Amike

Renato Corsetti, prezidanto de UEA

de: Katalin Kovats <redaktanto@edukado.net>

www.edukado.net

En julio aperis la

Manlibro pri Instruado de Esperanto

(Pretigita de internacia teamo de lingvoinstruistoj, redaktita de Katalin Kováts)

Eldonis: ILEI/Hago 2005. (2a eld.) - ISBN: 8096904264.

En 148 pagxoj kaj kompakta formato, jen praktika gvidilo por instruistoj kaj instruantoj, kiuj (vole aux preskaux kontrauxvole) trovis sin antaux la devo instrui nian lingvon. Unuflanke pedagogie kompetenta, aliflanke jen tre praktika verko kun konkretaj konsiloj. Gxi levas multajn temojn kaj dilemojn kiujn vi mem frontos en instrua rolo. La elektronike elsxutebla pli frua versio de la verko nun aperis post funda revizio kaj kompletigo en placxa papera formato. La preskvanto estis nur 300, el kiuj duono jam forvendigxis dum UK. Gxi estas mendebla cxe UEA:

<<http://katalogo.uea.org/>><http://katalogo.uea.org/>

kaj cxe ILEI: Stefan MacGill:

mailto:stefan.macgill@gmail.com>stefan.macgill@gmail.com

Pannonia u. 30,1,6, HU-1136 Budapest, Hungario aux

La vendoprezco cxe UEA kaj ILEI estas 7.50 EUR.

Cxe ILEI la prezo inkluzivas la sendokostojn, cxe UEA ili estos aldonitaj.

Artikoloj de la Manlibro iom post iom aperas en la LEGEJO de edukado.net ankaux en printebla versio.

Propagando por Esperanto

Historio kaj Homaranismo

“La plej grava tragedio en la historio de tragedio estas ne la tragedio mem, sed forgesi la historion de la tragedio”

Lee Chong- Yeong/honora prezidanto de Korea Esperanto Asocio

(Ĉerpita e; La mondon sen armeoj, sendita de japana samideanino Okada Sizuka septembre 2005)

Historiaj faktoj kaj vidpunktoj

Historio evoluas senhalte. Por evoluigi historion en la direkto dezirinda por la tuta homaro, ni devas klarvide lerni la lecionojn de la historio. Niaj praavoj ne povas esti ĉiam ĝustaj. Ili ankaŭ faris erarojn, kiujn iliaj praidoj ne devas ripeti. Historio instruas al ni, kion niaj praidoj devas lerni de ni, kaj kion ili ne devas ripeti.

Historiaj faktoj estas realoj, nek kaŝeblaj nek distordeblaj. Oni povas intence rigardi nur la ŝatatajn flankojn de la historiaj faktoj aŭ rigardi ĉiujn historiajn faktojn malkaŝe kaj objekte. Por rigardi tuatan realon de la historio objekte, ne ellasante malplaĉajn partojn, oni bezonas kuraĝon. La japanaj mezlernejaj lernolibroj de historio kiuj kreis multe da kritiko dum kelkaj jaroj estas kritikitaj, ĉar ili estas skribitaj de la vidpunkto de specifika nacio (la japanoj) kies naciaj interesoj foje ne kongruas kun tiuj de aliaj nacioj. Pro tio, la Konsilio de la japanaj Katolikaj Episkopoj anoncis en la 7-a de majo, 2001: “La historia vidpunkto de la Grupo (por verki la lernolibron) perfidis la deziron de la azianoj kiuj volas kune konstrui la socion kiu valorigas pacon kaj homajn rajtojn..” D-ro Hasumi Shigehiko, ĉe la diplomigceremonio en marto 2001: “Eĉ se la nuna generacio ne rekte kulpas, ni devas esti respondecaj pri la pasinteco de japnaio..distordo de la pasinta historio rilate al Koreio, kun kiu ni devas alfronti la estontecon komune, eble alportus al ni malgrandan memkontenton sed ne la kuraĝon alfronti la estontecon”.

La historio de rilatoj inter germanoj kaj judoj tiras mondan atenton pri la genocido de judoj fare de la nazi-germana registaro en jaroj 1930-1945. Peri tio, germana lernolibro de historio, memkritikante diris: “..La krimon la ŝtato organizis kaj ordonis, sed ne mem plenumis. Ne nur nazioj partoprenis sed centmiloj da germanoj estis ligitaj kun la krimo kaj milionoj da germanoj almenaŭ sciis pri la krima agado..” En tiu situacio, ne estas imageble, ke germana ĉefministro vizitos la tombejon de la Nazimilitkrimuloj por montri sian respekton. Malgraŭ tio, ke la Nazia Germanio invadis aliajn eŭropajn landojn, la senkaŝa konfeso de la idoj de la invadintoj instigis eŭropajn landojn, akcepti gvidan rolon de Helmuth Kohl, germana ĉefministro, fondi Eŭropan Union.

La germana (tiam prusia) urbo Koenigsberg estas la naskiĝloko de Emanuel Kant, germana filozofo, unu el la plej grandaj homoj en la mondo. Sed, post la dua mondmilito, la Alianco malfondis Prusion kaj donis Koenigsberg al Rusio, kaj nun ĝi estas nomita “Kaliningrad”, provinco de Rusio. Germana registaro postulis ĝis 1960aj jaroj revizion de la perforte decidita landlimo. Sed post la normaligo de rilatoj kun Pollando, nun Germana registaro akceptas la nunan landlimon.

Antaŭ kelkaj jaroj, iu juna profesoro de historio de Universitato de Lyon, Francio, rifuzis instrui la nazian kruelan agadon al judoj, ĉar “li mem ne vidis agreson akj li ne kredas la

kruelecon”. Pri tio, franca juĝejo oficiale malpermesis lin instrui historion, ĉar li ignoris la faktojn de historio pri kiuj socia konsento jam ekzistas.

La deklaro de Korea Sendependiĝo kaj Homaranismo

Homaranismo proponas pacan kunekzistadon surbaze de justeco, frateco, egaleco kaj neŭtraleco inter malsamaj nacioj, kaj la fundamenta bazo estas amo. La tuta spirito de la homaranismo estas enteneta en la Deklaracio de Korea Sendependiĝo de 1919.

La 1-an de marto 1919, 10 jarojn post la anekso de Koreio fare de Japanio, la korea popolo tutlande samtempe proklamis “Deklaracion de Korea Sendependiĝo”, marŝante sur stratoj, svingante koreajn naciajn flagojn. Kvankam la celo estis regajni la nacian sendependecon, la Deklaracio emfazis nek batalon nek malamon, sed pacan kunekzistadon. Ĝi deklaris: “..la intenco ne estas kondamni alian nacion pro malnova malamo..” kaj ankaŭ: “..La hodiaŭa ago estas manifestacio pri nia nacio al justeco, humaneco, pluekzistado kaj prospeo, kaj ni nur manifestu la spiriton de libereco, ne malamon..” kaj finis dirante :”..Ĝis la lasta homo, ĝis la lasta momento, ni manifestacios por plene montri la justan volon de nia nacio”.

La tuta esenco de la homaranismo estas entenata en la Deklaracio de Korea Sendependiĝo, pri kio ni, koreaj esperantistoj, estas fieraj.

Por instruo al la Praidoj

La historio instruos al niaj praidoj kiel vivi. Por tiu celo, estas tute necese, ke historio devas esti sendistorde, senkaŝe skribita, inkluzive de fierindaĵoj kaj hontindaĵoj de niaj praaŭoj. Fierindaĵojn ni instruas al niaj praidoj, por ke ili fiere ripetu kaj sekvu. Kaj la hontindaĵojn en historio ni instruas, por ke evitu tiajn kaj vivu pli feliĉe kun najbaroj.

La eksa germana ĉefministro, Helmuth Kohl, dum sia prelego en Iwazisima, Japanio, en majo 2001, diris: “..Germanio, sub la regado de Hitlero, estis la sangosoifa invadinto, kaj Japanio ankaŭ estis simila invadinto. Sed en Japanio aperis lernolibro kiu beligis la invadon..Ĉiuj homoj havas la komunan devon neripeti similan eraron..”

AHN Jung-kun, korea patrioto pafmortigis ITO Hirobumi, la unua japan ĝenerala gubernatoro de Koreio, en 1909 kaj Ahn estis kondamnita al mortpuno. Dum li estis en Lushun- malliberejo atendante la ekzekuton, lia japana gardisto CHIBA Toosichi respektis lian patriotan motivon. La japana gardisto kaj la korea mortpunoto, fariĝis amikoj, respektante unu la alian. Pro tio, Ahn lasis al Chiba sian lastan skribaĵon, pertuĉe stampitan de sia manplato kun tranĉitaj fingroj. Chiba konservis la lastan skribaĵon kaj transdonis ĝin al sia familiano, kiu donacis ĝin al korea registaro en 1980. La memormonumento estas fondita en Dairin-templo en Sendai, Japanio, lia hejmloko. SAITO Taiken, bonzo de la templo servadas 30 jarojn ĝis nun ĉe la templo, parolante la aferon.

Pri la rilathistorio inter Japanio kaj Koreio, KUBOI Norio, japana mezlerneja instruisto en takatugi, en sia lernolibro por mezlernejaj lernantoj skribis el la vidpunktoj de la popoloj kiuj volas vivi pace, ne kaŭzante malbonojn al aliaj. Kuboi malkaŝe skribis pri la invado de TOYOTOMI Hideyosi, anekso de Koreio, Kanto masakro, komfortvirinoj kaj korea sendependiĝa movado.

Esperanto, la glaciompilo de malamikeco

La homaranisma estoso de esperanto ludas gravan rolon por internacia kompreniĝado kaj amikeco, kaj ĝi servas kiel glaciompilo inter koreoj kaj japanoj.

KIJOMI Rikroo, japana esperantisto- verkisto, travojaĝinte Koreion en 1923, skribis ‘Al Junaj Koreoj’ syr La Revuo Orienta (JEI organo, julio 1926) jene: “Koreoj! Se efektive vi volas esprimi ĝisfunde viajn sopirojn, malĝojon, indignon, kaj ĉiujn nuancojn de sentimento, iru al Esperanto! Koreoj denaske estas talentaj je lingvistiko. Per malpli ol dekono da peno postulata en la lernado de japana lingvo, vi certe povos spertiĝi en esperanto”.

OOJAMA Tokio, kku fondis Seulan (tiam Keiĵ’o) Esperanto-Societon en 1922, kaj kies edzino estis koreino KIM Sun-Hak, skribis sur Donga- tagĵurnalo en 1925: “Karaj koreoj! Ni lernu Esperanton. Esperanto ne estas unu fremda lingvo, sed estas internacia kaj tutmonda lingvo. Ni ĉiuj lernu Esperanton kaj ni esperu la tagon kiam ni ne plu bezonas verdan stelon sur nia brusto”.

OKAMOTO Joŝicugu, sekretario de Japana Esperanto- Instituto, japana lingva instruisto de Keiĵo Instruista Lernejo kaj membro de nacilingva Konsilkomitato de la Korea kolonia gubernatora oficejo, diris dum oficiala komitatkunsido por malpermesi instruadon de la Korea lingvo, en 1939:

“Korea lingvo estas natura lingvo de korea nacio kaj ni ne devas abolicii ĝin perforte, kaj tio estas kontraŭ la ideo de la mondpaco kaj estas memdetrua politiko al japanio”.

Iniciatite de NISIO Tutomu kaj kelkaj aliaj japanaj kaj koreaj Esperanto-aktivuloj, “esperanto-grupo por la komuna lernolibro pri historio” agadas por krei amikecan etoson inter Aziaj esperantistoj. La grupo tradukis la historian lernolibron, “Enkonduko al la Historio de Japanio kaj Koreio”, verkita de Kuboi Norio, por malkaŝe sciigi historiajn faktojn al ambaŭ landaj junuloj. La aŭtoro kaj la Esperanto- grupo asertas: “Ni sinkritiku pri la historio de invado, utiligu la historion de paco kaj amikeco, kaj kreu la mondon sen naci-diskriminacio..”

Ni vidas ĉi tie, ke homaranismo, la interna ideo entenata en esperanto, progresigas la historion, eĉ tragedian, en pozitiva direkto. La plej grava tragedio en la historio de tragedio estas ne la tragedio mem, sed forgesi la historion de la tragedio.

Aŭdiobiblioteko por blinduloj pretigota en Albanio (Kontribuos ankaŭ blinda esperantistino Anisa Proda)

Lastatempe la preso kaj medio en Albanio sciigis pri komenciĝo de laboro por fondi la unuan nacian porblindulan bibliotekon. Temas pri speciala aŭdoteko el 5000 libroj kiujn la blinduloj povas uzi laŭplaĉe. La iniciato estas de Albana Instituto por Publikaj Rilatoj, estrata de s-ro Alban Bala. Inter tiuj kontribuantaj per sia voĉo estas ankaŭ Anisa Proda, studentino blinda kiu antaŭ tri jaroj eklernis Esperanton ĉe la blindulejo en Tirana. Anisa sin distingis ekde tiam per sia aparta intereso al la internacia lingvo. Ŝi komencis ankaŭ korespondi kun eksterlandanoj, ne laste ankaŭ kun s-ro Jacques Tuinder, kiu donacis malavare al ŝi porblindulan komputilon. Anisa posedas flue ankaŭ la anglan lingvon kaj estas diligenta studentino 17-18 jara.

Okaze la alia grava evento enlande, nome la poezia festivalo nomata “Poeteka”, aranĝita en la ĉemara urbo Durrës, en tiea amfiteatro, Anisa la unua recitis sian versaron. Jen kion raportas ĵurnalista pri ŝia debutado:

“La poezio de Anisa sonas ĉiam freŝa kaj petoleca, ĉar la improvizo en sia poezio estas ege prezenta, tiomskale ke Anisa ĝuigas nin plurecon de variantoj por la sama poezio ol por unu tia fiksitita.

Nehat Sokoli

Vizitoj de fremdaj samideanoj.

En aŭgusto vizitis Albanion kiel gaston de s-ro Shaban Hasani samideano el Tulono, Francio, s-ro Roberto Pontnau. Li estis vizitinta Albanion ankaŭ 25 jarojn antaŭe enkadre de kolektivaj vizitoj realigitaj tiutempe de komunisma reĝimo. Roberto promesis sendi kelkaj fotoĵoj faritaj de li tiamtempe, same artikololon verkitan de li kaj aperigita en franca ĵurnalo.



S-ro Roberto la unua dekstre en kafejo en Tirana, 16an de aŭgusto 2005

En septembro alvenis du hispanaj (katalunaj) juna geparo, Lluís Goruú Casademont kaj Estel Figuras Saborit, studentoj de fiziko en universitato de Barcelono. Ili anticipe estis informiĝinta pri Albanio kaj estis lerninta kelkajn albanajn vortesperimojn. En Tirana ili renkontiĝis kun tri junaj esperantistinoj, Rosela, Eleda kaj Doris, gastis ĉe Bardhyl unu tagon, vizitis la historian urbon de Kruja akompanate de juna esperantisto Ulián Binozi, kaj aliajn urbojn (Durrës, Vlora, Saranda ktp.)

Novaĵoj regionaj

SEPA KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ Z A B O K, 2005

La prezidantaro de Kroata esperanto-ligo ĉe sia kunsido la 16-an de decembro 2004 akceptis ke sepa kongreso de kroataj esperantistoj okazos en Zabok.

Dum la sepa kongreso oni celebros kaj rememoros eventojn el pasinteco de esperanto-movado en Kroatio:

- ❖ antaŭ cent jarojn en la jaro 1905 en la kroatlingva gazeto «**Obzor/Horizontalo**» por la unua fojo estis aperigita artikolo pri Esperanto, subskribita per pseŭdonomo M.Esperanto,
 - ❖ pasintare estis 95 jarojn ekde kiam 2-an de januaro 1909 estis organizita “**Unuiĝo de kroataj esperantistoj**”, kaj samjare 10-an de aprilo komencis aperadi la unua esperantlingva gazeto “**Kroata esperantisto**”,
 - ❖ antaŭ 60 jaroj, tuj post la 2-a mondmilito, 9-an de septembro 1945 rekomencis laboro de kroataj esperantistoj per la fondigo de “**Kroatia esperanto - ligo**”.
- La monda esperanto-movado rememoras:
- ❖ cent jarojn post la unua Universala kongreso en Bulonjo ĉe Maro.

Kongresaj temoj estos:

- ❖ **kroatia** kun la titolo: “*Politika penso en Hrvatsko Zagorje: Ekde ilirismo ĝis la sendependa ŝtato*”,
- ❖ **eŭropa** kun la titolo: “*ESPERANTO – oficiala lingvo de Eŭropa Unuiĝo*” kun kongresa propon-rezolucio.

Ekskurso

En programo de la sepa kongreso estos antaŭvidata peraŭtobusa ekskurso al la plej belaj kasteletoj kaj preĝejoj de Hrvatsko Zagorje.

Loko

Baza lernejo «Ksaver Ŝandor Gjalski» en Zabok.

Dato

18-a kaj 19-a de junio 2005

(Noto : la novaĵo atingis nin julie 2005)

Novaĵoj el Henri Masson

ekde de la tutmonda kongreso de la Libera Penso kiu havis lokon en Parizo, kaj kiu akceptis mocion favore al la uzo de Esperanto kiel lingvo de rektaj intershanghoj kaj de justa lingva komunikado, ankaŭ la nacia Kongreso de la Libera Penso, okazinta la 27an kaj la 28an de aŭgusto en Metz, Francio, voĉdonis favore al mocio kiu instigas la liberpensulojn al uzo de Esperanto kaj la Liberan Penson al kreo de "Esperanto-Komisiono".

Bonvena estos helpo de esperantisto (j) por traduki la dokumenton de la franca al Esperanto por disvastigo kaj enretigo che la ttt-ejo de la LP : <<http://librepenseefrance.ouvaton.org/>>.

El diplombolaborado de niaj studentoj

Ulian Binozi

(Sub la tutoreco de Prof. Boĵidar Leonov)

Tirana, la evoluo kaj la turisma potencialo

Kie situas Albanio

Albanio, estas lando etendiĝanta en la centro de la Balkana Duoninsulo enhavanta 3.388.000 loĝantoj, je surfaco entute 28.748 km². Ties akva surfaco okupas 1.350 km² kaj la surtera 27.398 km². Albanio havas mediteranean klimaton kaj ĝi karakteriziĝas de varma somero sunplena kaj malvarma vintro kaj pluvofaloj.

La ĉefurbo estas Tirana je 750.000 loĝantoj, la valuto nomiĝas Lek konvertebla rilate la usonan dolaron 1usd = 100 Lek kaj eŭron 1 euro = 120 Lek. La lingvo estas la albana, loka lingvaĵo heredita de generacio al generacio de la samaj antaŭuloj de albanoj, iliroj, parolintaj ĝin antaŭ Kristo kaj eĉ tiam kiam la limoj de Albanio aŭ de iama Ilirio etendiĝis ĝis tie kie hodiaŭ estas Buĥaresto, lingvo hindoeŭropeca je 36 sonoj kaj literoj, el kiuj 7 estas vokaloj kaj 29 konsonantoj.

Religia aparteco el tri manieroj montras klare ke Albanio estis ja lando kie transpasis ĉiuj plej fortaj armeoj de Eŭropo kaj kie ĉiu armeo volis demonstracii sian forton kaj kulturon, kaj ekde tiu momento Albanio konsistis el loĝantaro je 70 % muslima, 20 % grekortodoksa kaj 10 % romkatolika.

Albanio limiĝas kun Grekio sude laŭ limlinio je 282 km kaj kun Makedonio oriente laŭ limlinio je 151 km, norde ĝi limiĝas kun Serbio & Montenegro kaj Kosovo laŭ limlinio je 287 km, dum okcidente Albanio akviĝas de du maroj, Adriatika kaj Jonia kaj posedas nur unu insulon, kiu estas kvazaŭ la limo inter ambaŭ maroj heredanta nomon ekde otomana okupado en Albanio, la insulo de Sazano. La ŝtata telefonkodo estas 355 kaj mem la ŝtata kodo AL, kaj Albanio ekĝuis sendependecon ekde 28 novembro 1912.

Albanio , historia-kultura informacio

Albanio reprezentas landon je demokratia parlamento kun pluraj partioj kaj prezidenton, registaron kaj armitajn fortojn kaj enhavanta nacion spertinta multajn konkerantojn kaj multaj reĝimojn la lastajn 100 jarojn: konkerintojn, reĝlandon, komunismon kaj ekde 1992 jaro estas instalita demokratia reĝimo danke al la libera voĉdonado fare de la popolo. Hodiaŭ la tuta albana socio kunfrontiĝas al la vivo enlande kaj en emigracio ne elirante el ĝia kultura kaj historia akso.

La albana kulturo kaj la tuteco de ties atingoj estas bazita sur ĝenerala nacia kulturo kaj je religia, regiona kaj idea rangoj. La vivo de albanoj same estas bazita en la lokaj kaj regionaj kulturoj, ekde la altaj montoj de Nordo, malaltaĵoj de Lezha kaj Lushnja ĝis la okcidenta elirejo kie ĝi akviĝas de du maroj, Adriatika kaj Jonia. La albana nacia standardo havas ruĝan koloron kun nigra aglo dukapa en la mezo kaj estas ja tiu flago levigita la tagon de la proklamo de sendependecon je 28an de novembro 1912 en Vlora, plue tiu flago leviĝis ankaŭ en la Kongreso de Lushnja kaj post finiĝo de la Dua Mondmilito ĝis nuntempe. Unu el niaj naciaj herooj konata en la historio de Eŭropo, Gjergj Kastrioti Skanderbeg, estis la unua homo demandinta la unuiĝon de albanoj por sia lando sen fremdaj konkerintoj, batalinta 25 jarojn kontraŭ la otomanajn hordeojn

fariĝante plej bona protektanto de kristanismo en Eŭropo. La patrino Tereza aŭ Terezo de Kalkuto same estas virino konata de la tuta mondo kiel bonfaranton kaj senlaca religiulo dediĉinta sian vivon al la bonfaraj misioj en ĉiuj malriĉaj landoj enmondo, ĝia nomo estas Gonxhe Bojaxhi (Gondĵe Bojaĝi) kaj la naskiĝloko estis Skopje.

Tirana , enkonduko en la temon kaj historio

Tiu ĉi tasko aŭ studo temas pri la urbo de Tirana kaj la vivkampoj kie oni demandas pli da evoluiĝon kaj moviĝon fare de lokanoj kaj fremduloj same vizitantaj ĝin pro personaj kialoj, kiuj povas esti religio, komerco, studado ktp. Kaj en sia historio Tirana estis la plej granda centro de ĉiuj bazaroj realigitaj en la tuta lando kaj ekster ĝi. La imediata evoluiĝo de la vivo kaj agrokulturo rezultigis en tion ke la kampo de Tirana ekskribu historion alie, ne samkiel Skanderbeg batalis kontraŭ turkojn. Tirana nun fariĝis loko provizante produkton el ties agrokampoj kaj evoluon de loĝantoj danke al la komercplacoj kie povis labori kiu ajn.

Tri hipotezoj pri la nomo de Tirana .

Hipotezo de latinaj historiistoj

Oni pensas ke la nomo Tirana devenis de la vorto Theranda, menciita en la pratempaj skribofontoj latinaj kiun la lokanoj nomis Te Ranat, ĉar la kampo estis formita rezulte de inertaj materialoj alportitaj de la akvoj el montoj kaj montetoj ĉirkaŭ ĝi.

Hipotezo de Bizantoj

La nomo Tirana devenas de vorto Tirkan. Tirkan estis kastelo surdeklive de la monto de Dajti, kies ruinaĵoj videbliĝas ankaŭ hodiaŭ. Tiu ĉi nomo datiĝas ekde la komenco de unua jarcento antaŭ Kristo. La kastelon de Tirkan mencias ankaŭ Prokopo, granda bizanca historiisto, kiu difinas same ankaŭ la lokon samnoman.

Hipotezo de Grekoj.

Tirana devenas de Malnova Greka per la vorto Tyros signifanta laktaĵon aŭ laktajn produktaĵojn kaj oni opinias ke tiu versio postrestis pro fakto ke en la kampo de Tirana ĉiamtempe oni estis produktanta kaj vendanta laktaĵojn.

Unuafoje la nomo Tirana

Tirana estas menciita en la jaro 1418 en la dokumentoj de Venecio, dum la registriĝo de agrokampoj estigita de otomanoj de jaro 1430 ĝis 1431.

Tirana , kiel ĝi estas fondita

Kiu ajn vivmaniero en Albanio, kiu ajn moviĝo aŭ decidopovo ks havas sian centron en Tirana, landa ĉefurbo. Tirana proklamiĝis urbon kaj fondiĝis de Sulejman Pasha. Li konstruis moskeon, panbakejon kaj turkan banejon (Hamamon). Li kreis ankaŭ la unuan sendependan administrantaron el la vicoj de osmanemuloj aŭ de homoj el aliaj urboj kiel Durres kaj Shkoder. Lia nepo Ibrahim Bej finkonstruis la horloĝturon en la jaro 1830. Tirana konis rapidan evoluiĝon en komerco kaj produktado de agrokulturaĵoj kaj laktaĵoj.

La registaro de Albanio elektita de Kongreso de Lushnja en la jaro 1920 proklamis Tirana-n ĉefurbon de la lando. La jaro 1930 notis pli vastan vizion je konstruado. La placo Skanderbeg, la strato de Durres kaj ĉiuj ekzistantaj registaraj domoj estis konstruitaj laŭ la direkto de granda arkitekto Eshref Frashëri (Eŝref Fraŝeri). Same similaj konstruaĵoj faritaj servis al la sistemo starigita de reĝo Zog.

La itala okupado de Albanio notis la konstruiĝon de pliaj registaraj domoj kaj la grandan bulvaron, subgvide de faŝistaj inĝenieroj Armando Brosini kaj Emanuele de Fausto. Ili konstruis multajn domojn cele la konkeradon de la lando senmilite. Dum la jaro 1943 ankaŭ Tirana samkiel aliaj urboj en Eŭropo estis trafita de detruigoj. La komunisma reĝimo rekomencis la laboron por konstrui novajn domojn kaj rekapabligi tiujn je kultura valoro. La preĝejo de Sankta Maria konstruita de de hungara imperiestro Jozefo la Unua kaj la unua moskeo de Tirana konstruita de Sulejman Pasha estis sufiĉe amortizitaj pro bombardoj. Ili ekzistis tie kie hodiaŭ estas starigita la dekkvinetaĝa hotelo Tirana Internacional kaj la monumento dediĉita la la Nekonata Soldato.

Tirana, geografia pozicio kaj klimato

Tirana urbo je 750 000 loĝantoj kaj ĝenerala surfaco kune kun ĉirkaŭaĵoj je 12 80 km² , je 110 m super la marnivelo, troviĝas sur la sama paralelo geografia kiel Napolo, Madrido kaj Istanbul, dum en la sama meridano kun Budapeŝto kaj Krakovo. La urbo etendiĝas en la kampo de Tirana inter la montet-vicoj de Sauk, Bovilla kaj monto de Dajt (1612 m).

La mediteranea- kontinenteca klimato igas ke la somero estu varma je averaĝa temperaturo 27° C kaj vintre malvarme kaj je pluvofaloj je averaĝa pluvofalo 1200 mm jare kaj averaĝa temperaturo 7° C . Ĝi havas riĉan naturon je monta arbaro, naciaj parkoj kaj turismecaj punktoj. La montetoj ĉirkaŭ Tirana estas riĉaj je herbaro kaj olivejoj. La tereno favorigas multe la agrokulturon, aferismojn kaj turismon.

Tirana limiĝas kun urboj de Elbasan sude, Durres oriente kaj Lezha kaj Kruja nordoriente.

La Adriatika Maro situas nur 28 km je aerlinie aŭ 40 km je aŭtovoje fore kaj en ĝin enfluas du riveroj de Tirana, la Rivero de Tirana kaj Erzeno. La lagoj en la tuta ĉirkaŭaĵo de regiono estas artefaritaj, konstruitaj de homoj helpe al agrokulturo.

La arbaroj estas tre riĉaj je avelujoj, nuksujoj kaj multaj aliaj specoj de arboj kiel abio, pino, piceo, cipreso ks. Bestoj diverspecaj troveblaj en ĝi estas la bruna urso, apro, vulpo, lupoj kaj mustelo dum birdoj troviĝeblaj en ĉi tiuj areoj montaraj kaj arbaraj estas : falko,

aglo kaj arbara strigo. Ĉi tiuj parkoj allogas ege la ĉasistojn ĉar estas frekventeblaj areoj por ĉasado.

Tirana , komunikado kaj informado

Ĉiuj vojoj de Albanio kondukas vin al Tirana kaj inverse. La veturado estiĝas per aŭtoj, taksioj, busetoj kaj busoj. Nun en Tirana estas jam funkcia ankaŭ la telfera servo liganta la urbon kun la areo de la monto Dajt. La ebleco por veturi al Tirana de eskterlando baziĝas sur aviadiloj kaj busoj. Tirana estas same la centro de ĉiuj radio-televizivaj, retaj, sendrataj telefonaj ks. La komunikado estas ebla same per medio, revuoj kaj ĵurnaloj. La demokratia sistemo de la albana politiko servoj ne cenzuras la informacion, kontraŭe ĝi influas en ties evoluiĝo kaj distribuantoj de publika informacio. Estas ja tri punktoj de buslinioj el tuta Albanio en Tirana; la ununura stacidomo funkcias regule ĉiutage je plena kapacito liganta Tirana-n kun pluraj aliaj ĉefaj urboj kiel Shkoder, Fier, Lushnje, Vlora, Pogradec ktp. La libro kaj la albanaj aŭtoroj estas konsistigantaj faktoroj de kultura informado por la albana publiko ĉiam pli forte per libromarkato en tuta lando. La nacia biblioteko estas plua faktoro montranta ankoraŭfoje ke Tirana estas grava granda centro kie oni vivas kun moviĝo kaj informacio. La grandaj aferismoj same distribuas informacion favore al sia aktiveco kaj aldone ili estas influantaj en la lernigado de homoj je laborceloj. Tuta ĉi tio rezultigis en favora evoluiĝo de la publiko kaj ties kontaktoj kun diversaj komunumoj enmonde kiuj cetere kontribuas kaj instigas pli la moviĝon de la albana socio.

Tirana , religio

La religio konsistanta el kelkaj konfesioj en la sino de popolo de Tirana estas influinta kiel edukan kaj produktivan faktoron en ĉiuj tempoj per ĉiuj ties manifestacioj. La religio samkiel en Albanio ĝenerale ankaŭ en Tirana dividiĝas laŭ tri konfesioj: muslima 70 %, grekortodoksa 20 % kaj romkatolika 10 %. Sed en Tirana ekde 200 jaroj estas la rezidejo de tutmonda beктаšia muslima sekto. Bektaŝioj estis forpelitaj perforte de Turkio dum la tempo kiam ĝi proklamis sian unuan laikan respublikon (en 20 jaroj de XX jc). Dum la tempo de komunismo la religio estis persekvita kaj atakita, plue ĝi estis malpermesita kaj oni rigore kondamnis tiujn kiuj kredis je Dio. Ekde la jaro 1966 ĝis 1990 la lando vivis sen religiaj institucioj kaj praktikoj, do 25 jarojn daŭris ateisma reĝimo.

En tiu tempo kiam la tuta mondo konis tion, Gonxhe Bojaxhi (Gondje Bojadji) konata kiel la plej granda bonfarantino , je pseŭdonimo Terezo de Kalkuto, estis kolorigante la vivon de multaj malsanaj infanoj per amo kaj helpaĵoj. Tio okazis en multaj landoj malriĉaj de Azio kaj Afriko. Ŝi naksiĝis en la jaro 1914 en Skopje kaj mortis en la jaro 1998 en Kalkuta de Hindujo, ĝuste tie kie ŝi servis tutan tempon.

Alia konsistiganta faktoro por la religio estas ankaŭ la kultoj, institucioj kaj monumentoj kiuj dum la tuta tempo ekde la jaro 1990 estas servinta al religio kaj kreduloj. Monumentoj je granda kultura valoro eskapis de damaĝiĝo kaj transformiĝo dum la tempo de komunismo.

Tirana , aranĝoj kaj distraĵoj

Diversaj aranĝoj faritaj je distra celo aŭ kontentigo de junularo kaj tuta civitana maso de Tirana diferenciĝas je karaktero kaj lokiĝo kaj estas multnombraj. Tio montras plue ke kiamaniere oni ekspluatas amuzejojn ekde la disfalo de komunismo. La urbodomo de Tirana ĉiujare estras en la plenumado de amasaj amuziĝoj je karaktero socia demokratia kaj patrioteca, historia-kultura, beletra, artisma. La belaj lokoj kaj tiuj historiaj ĉirkaŭ Tirana estas faktoro influanta en la popolon instiganta moviĝon ankaŭ por la disvolviĝo de loka kaj agrokultura turismo.

La piknikoj estas ĉiam organizitaj de familioj kreantaj samtempe ian komunumon ne registritan tiucele. Alia aranĝo estas tiu je tipo kumpumado kaj koncertoj kiuj estas je distra karaktero kie partoprenas volonte ankaŭ gejunuloj el la tuta Eŭropo. Tiaj aranĝoj okazas kutime en la ĉirkaŭejoj de la urbo. La sportoj estas ĉiam ŝatataj de homoj en Tirana, same la aranĝoj je eduka kaj sportema senso je moto “por senproblema vivo”. Ĉiuj loĝantoj de Tirana submetiĝas al diversaj eduk-aktivecoj kiel futbalaj, bicikladaj, kuradaj ktp.

Ĉi aktivecoj strebas amasan edukiĝon.

Se ni prikonsideras la vivmanieron de Tirananoj, certe ni konstatos ke ĝi reprezentas unikan memorganiziĝon kun ties konsistigantaj faktoroj.

La specoj de moviĝoj (turismaĵoj)

En ĉi tiun geografian, naturan, kaj kulturalan potencialon la urbo de Tirana estas metita je la servo de ĉiuj movadoj aŭ turismaĵoj farataj.

Komercaj movadoj

Ĉiuj movadoj farataj cele al la komercado de produktaĵoj estigas ankaŭ moviĝon de ĉiuj strukturoj tion orgaganizantaj kaj donas evoluiĝon kaj bonfarton en ĉiuj kampoj: en hoteloj, restoracioj, koncertejoj, internulejoj kaj aliaj terenoj por la disvolviĝado de komercaj aktivecoj kaj ĉi tiuj kuniras paralele kun la prezoj de ĉi tuta moviĝo aŭ pli bone diri, la prezoj varias laŭklase.

Ĝenerale la altaj servoklasoj bonvenigas ĉi tiujn aranĝojn kiel ja estas konferencoj, seminarioj kaj reklamiĝoj (promocioj). La kosto kaj la profito el tiu turismo estas sufiĉe granda kaj je tro da lukseco. Ĉi tiu moviĝo estiĝas kiel ene tiel ankaŭ ekster la lando kaj ĝuas la plej grandan interesiĝon de administrantaro kaj pli kvalitan servon de informado, komunikado kaj akomodado. La servoj kaj la luado aŭ kreditado estas same komponentoj de ĉi tiu moviĝo..

Sportoj

La ĉempionecoj kaj aliaj sportaj aktivecoj estas same grandaj movadoj kaj favoriĝas de altaj interesoj kaj servoj disponigitaj al tiu turismo per : sporthaloj, stadionoj, placoj, servolaboristoj kaj sur terene lokoj por trejniĝo de sportistoj kaj la kuraciston. Ĉi tiu turismo donas grandan profiton kaj movigas fenomenojn ĉiam pli novajn, adaptitaj al la tereno kiam temas pri montaj sportoj aŭ biciklado kiuj postulas pli grandan organizitecon ol ekzemple futbalo aŭ permanaj ludoj.

La fiŝkaptado estas sporto kiu akomodigaĝas je la formo de kampumado kaj la servoj por ĝi estas porteblaj kiel: la tendoj, banejoj, nutraĵprovizejoj ks.

Historio, kulturo, monumentet kaj religio.

Ĉi tiuj kulturaj konsistigantoj kreas moviĝon pli lokan aŭ ni diru 70% el lokanoj, 20 % el etnaj sampatrianoj kaj 10 % fremduloj alvenintaj por viziti ĉi tiujn lokojn je nacia valoro. Je la servo de ĉiuj eventualaj demandoj estas la malgrandaj aferismoj aŭ hoteloj kaj restoracioj kiuj donas ankoraŭ pli malpli da koloro al la aranĝoj. Ĉi tiu moviĝo cele la konatiĝon de la lando aŭ amuziĝon estas multe ŝatata de lokanoj kaj tio donas plian propulson al la disvolviĝo kaj agrokultura turismo kiu en Tirana estas ege paralizigita pro maniero de promociado kaj direktado. La multnombraj monumentoj estas komponento kiu alportas moviĝon je 30 % el eksterlando kiuj strebas al arkeologiaj valorajoj de monumentoj kaj kasteloj en la distrikto de Tirana. Koncertoj estas alia komponento de ĉi tiu moviĝo kultura kie nun la albana muziko harmoniiginta la popolan kaj modernan muzikojn altiras ege la publikon de Tirana kaj tutan ceteran albanan.

Naturo , parkoj , riveroj kaj lagoj

La naturo ĉirkaŭ Tirana estas tre riĉa je arbaroj, naciaj parkoj, lagoj kaj riveroj. Tiu riĉa naturo altiras multajn ties admirantojn kiuj en si mem estas same organizantoj ankaŭ de multaj privataj aktivecoj je familia aŭ socia rangoj, aŭ pentristojn kaj fotistojn kiuj per la vidaĵoj promociigitaj per preso kaj medio estas altirintaj al tiu ĉi turismo ankaŭ homojn je fremda nacieco vizitantaj ĉi tiujn mirindajn lokojn je sportaj celoj kiel fiŝkaptado, ĉasado, biciklado, montogrimpado ktp.

Sciencistoj aŭ mediprotektantoj, homoj bezonantaj puran aeron el la lando aŭ eksterlando povas renkontiĝi dum 12 monatoj de la jaro en ĉiuj ĉirkaŭaĵoj de Tirana, kie oni rimarkas naturon, kiu sub la prizorgado de ŝtata administrantaro stimuliĝas ĉiutage por altiri homojn, danke al la subteniĝo fare de hotel- kaj restoraci-servoj, kampumadoj ktp.

La lagoj estas multnombraj sed ne tre grandaj kaj en ili estas ĉiamtempe aktivecoj. Ili estas frekventataj. Same certaj punktoj ĉe riveroj kie oni ekzercadas manierojn de plaĝbanado. Oni ofertas ankaŭ agrokulturajn turismon kaj naturan kuracadon..

Medicino, kuracado kaj sanigado.

Nuntempe en la studadcentro Patrino Tereza ĉe la civila hospitalo en Tirana kaj en iu privata kliniko albana-usona oni komencis ekzerci koroperaciojn kaj de aliaj korpopartoj same transplantiĝojn, kio rezultigis flukson de klientoj kaj pacientoj el la lando kaj el la ties najbaraj. Tiu ĉi moviĝo estas rigardata tuje je granda interesiĝo por ke ĝi disvolviĝu kiel apartan manieron de traktiĝo de pacientoj, same de homoj ilin akompanantaj. Tiu ĉi moviĝo posedas je sia servo tutan potencialon kiu subtenas tiajn moviĝojn kiuj en ne malmultaj kazoj sponsoriziĝas de fondacioj, ŝtato, konsulejoj aŭ registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj. Tiu ĉi moviĝo havas koston tre altan same grandan profiton.

Studado

Tirana kiel grandan centron kaj gvidanton de la albana intelektularo atendas ĉiujare studentojn abiturientojn dezirantaj plustudi en universitatoj kaj aliajn studentojn. Tiu ĉi speco de moviĝo havas sian studentan urbeton kie la internulejoj kaj hoteloj por studentoj celas la servon kaj akomidiĝon de studentoj. La banksistemoj nun provizas aliajn facilajojn por tiu ĉi vivmaniero, dume la privataj hoteloj estas tre multekostaj por studentoj.

La maniero de agrokultura servado

La agrokultura turismo en la distrikto de Tirana estas ne tiom disvolvigita, sed ĝi estas konsistiganta parto de ĉiuj ceteraj specoj de servadoj en hoteloj, restoracioj ka..

Registaraj planoj por faciligi kaj disvolvi la turismon

Vizakirado

Jam oni estas notintaj ĉiujn rimarkojn de fremdaj turistoj kiuj rajtas eniri Albanion kontraŭ ia pagaĵo ĉe la landlimo kaj plenumiĝo de plej mallonga proceduro por vizakirado, sed nia registaro devas siaflanke entrepreni certajn rimedojn kontraŭ la terorismo okazanta en Eŭropo aktuale. Tiel ĝi devas certiĝi pri ĉiu turisto alvenanta ĉe nin, samtempe faciligi la flukso-ondon de ili aparte dum la somera sezono, kiu estas ja plej preferata por nia mediteranea lando.

Malaltiĝo de la prezoj

Tiu ĉi plano pristudas ankaŭ la universaligon de la prezoj en ĉiuj hoteloj de la tuta lando, krom la unuaklasaj hoteloj kaj oni opinias ke baldaŭ ni ekhavas hotelojn je standardaj prezoj variantaj de 10-12 eŭroj por tranokto, kio plifaciligas la pagojn kaj pliigas la alvenojn el eksterlando.

Vojoj kaj infrastrukturo

Vojoj kaj infrastrukturo estas problemeca en pluraj lokoj eĉ ĉe tiaj historiaj monumentoj en la areoj ĉirkaŭ Tirana. Ili estas ĝenerale ege amortizitaj, kio altiras prave la atenton de turistoj.

Pro tio, la urbodomo de Tirana, aparte ties estro Edi Rama, estas laborante serioze por rekonstruado kaj bonmastrumado de elementoj de la urba infrastrukturo, engaĝinte ĉiujn ŝtatajn kaj privatajn organismojn, kio evidentas por ĉiu hodiaŭ. Dumtempe oni prizorgas pli pri hoteloj, restoracioj, amuzejoj ktp..

Plej famaj monumentoj de Tirana

Famaj monumentoj en Tirana estas multnombraj kaj multspecaj. Ili havas grandajn valorojn kaj reprezentas ian honoron por la nacio nia, ĉar estas ja fragmentoj de nia vivo. Plimulto el ili estas konstruitaj de albanoj mem.

La moskeo de Et-hem bej kaj la horloĝturo

La moskeo de Et-hem Bej

Laŭlonge de la strato ekde monumento de Skanderbeg troviĝas la moskeo de Et-hem Bej kaj post ĝi estas la horloĝturo. La konstruiĝo de tiu moskeo komenciĝis en la jaro 1789 kaj finiĝis en la jaro 1823 sub la gvido de Et-hem Bej kiu investis por tiu moskeo. Tiutempe tiu moskeo estis unu el plej gravaj monumentoj. La moskeo estis trafita de domaĝoj dum la dua mondmilito sed dum la komunisma periodo ĝi ripariĝis. La statuso kiel kulturalan monumenton ĝi akiris en la jaro 1960, de tiama ateista ŝtato. La moskeo sin distingas pro harmoniigitaj proporcioj inter la preĝohalo, portiko kaj minareto samkiel pro ŝtonĉizaĵoj ĉirkaŭ la minareto kaj laŭlonge de ĝi. La pentraĵoj same estas alia parto alloga de ĉi tiu moskeo.

La horloĝturo

Tiu ĉi horloĝturo estas projektita kaj konstruita de la sama homo en la jaro 1820, ĝi altas 35 metrojn kaj portas ĉekape grandan horloĝon uzita iamtempe en iu turo en la urbo de Shkoder, post la dua mondmilito, kaj kiu ankoraŭ funkcias ekde tiutempe. Ĉi tiu turo konstruiĝis en la sama kadro kun la moskeo je moto: ni donu ian vizaĝon al la urbo, kaj ĝi estas ja la plej interesa monumento de Tirana. La investaĵoj por tiu turo apartenas al la familio Toptani, historia fama familio, kiu ekde la jaro 1820 prizorgas (ankoraŭ hodiaŭ) pri tiu tre aparta monumento. La turo harmoniiĝas perfekte kun la domoj ĉe bulvaro kvankam ĝi estas konstruita 110 jaroj pli frue ol ili.

La bulvaro de Tirana (monumenteca ensemblo).

La bulvaro “Deshmoret e Kombit “ (la martiroj de la nacio) estas proklamita de la urbodomo de Tirana kiel monumentecan ensemblon pro siaj apartaj karakterizaĵoj en ĉiuj domoj laŭlonge de ĝi kiuj estis projektitaj kaj konstruitaj de italaj faŝistaj inĝenieroj Armando Brosini kaj Emanuele di Fausto en la jaro 1935. La parto ekde la domo de universitato de Tirana ĝis la monumento de Gjergj Kastrioti- Skanderbeg nomiĝas “Bulevardi Deshmoret e Kombit” (La martiroj de la nacio).

La centro de la urbo aŭ la mezo de bulvaro nomiĝas “Placo Skanderbeg” dum la dua parto de la bulvaro nomiĝas “Bulevardi Zog i Parë” (Bulvaro Zog La Unua”), mbret i shqiptarëve (reĝo de albanoj).

La arkitekturo de ĉi tiu ensemblo estas je konstrukta stilo romia kaj ĉiuj stratoj de Tirana ligiĝas kun tiu bulvaro kiu cetere estas simbolo de Tirananoj.

La citadelo de Tirana

La citadelo de Tirana estas servinta kiel vojstacion por la vojego Egnatia je tipo mansio-mutatio. La citadelo konsistigis la centron de loĝloko kiu nomiĝis plurvarie dum jarcentoj pasintaj antaŭ Kristo. La citadelo de Tirana estas la plej malnova monumento ankoraŭ ekzistanta neniam ruinigita pro multaj militoj okazintaj en Tirana. Tiu ĉi loko estas servinta al ĉiuj okupantoj de la lando kiel administran oficejon aŭ arkivejan ĉambron. La defendosistemo de la citadelo estis tre bone pripensita kaj je alta skalo defendostrategia. Dum diversaj tempoj okazis ja multaj militoj ĉirkaŭe sed la defendosistemo de la citadelo sukcesis savigi sufiĉe bone la vivon al la batalantoj. La citadelo de Tirana troviĝas apud la urba centro, ĉe la monumenteca tombo de Mulao Beo aŭ moskeo kaj horloĝturo, do tio montras klare ke ĝi estis antikva centro de Tirana.

Ponto de Tabakoj

Fondiĝinte Tirana kiel urbon kaj grandan bazarcetron, oni rimarkis ian evoluigon de metiarto, konstruado kaj stratopavimado. Kiel bezonon por interligi ambaŭ partojn de la urbo detranĉitaj de la rivereto de Tirana oni konstruis la Ponton de Tabakoj kiu ne nur kunigis la urbon sed estis ankaŭ bona vojkonjektilo kun la nordo de Albanio. La ponto estas konstruita de Tabakoj, riĉa gento je altaj interesoje por konstrui tiun modestan ponton el ŝtono je originala loka stilo kiu ankoraŭ ekzistas hodiaŭ, aparte post la rekonstruiĝo estigita en la jaro 2004 kaj ĝi estas proklamita kulturalan monumenton. Ĝi, konstruita en la jaro 1614, ĝis la jaro 1944 servis kiel pasejon je plena laborkapacito, sed post kiam dum la periodo de komunismo oni konstruis plurajn aliajn gigandajn pontojn, vojojn kaj loĝblokojn, ĝi perdis sian gravecon kiel servilon por la civitanoj, plurestante nur kulturalan monumenton de Tirana.

Aspekto de Tirana je la unuavide

Tirana jam post la jaro 2000, kiam oni faris planon por la entuta reguliĝo de infrastrukturo urba, ĝuas novajn asfaltitajn stratojn kun ĉiuj orientigaj ŝildoj. Ankaŭ la stratetoj estas ampleksigitaj en tiu rekonstrua plano. La domoj same, en areoj aŭ kvartaloj plej videblaj de la urbo submetiĝis al reguliĝo kaj sistemiĝo laŭ ĉiuj aspektoj de urbanismo. La domoj estas pentritaj diverskoloro postkiam oni demetis el la fasadoj la amortizitan kalkotavolon, kreante tiamaniere ian harmonion kun la vivo en la urbo kaj tre allogan aspekton por la ĵus alvenintoj. La vivo enurbe trapasas en plibeligitaj spacoj. Ĉiu loko havas veston je koloroj kaj formoj multvariaj modernaj. La novaj domoj samkiel la novaj stiloj multformaj estas donintaj novan vizion al la tuta urbo kaj estas submetitaj same al la konservado de tiu karaktero multforma kaj multkolora kiu laŭopinie estas ja la originala albana stilo adaptita al la malnova unuforma komunisma stilo. La lumigo de la stratoj kaj de la tuta urbo estas renovigita en originala maniero albana.

La periferiaj kvartaloj de Tirana estas troŝarĝitaj prikonsiderante la elektran provizadkapaciton ofertata, pro tio dum la antaŭtagaj horoj oni spertas restriktajn de elektro. Kiel ajn la ŝtatpotenco estas serioze prikonsiderante tiun gravan problemon kaj de tago al tago la situacio pliboniĝas. Multaj firmaoj kaj privatuloj uzas ankaŭ la elektron produktitan per generatoroj. La akvo alvenanta en ĉiun domon estas je alta kvalito de pureco kaj estas trinkebla sed ankaŭ la akvo ne estas havebla tutan tagon. Tamen la civitanoj uzas akvorezervejojn instalitajn en siaj domoj, kio montras ke Tiranoj aprecas la valoron de la akvo por sia higieno kaj nutrado. La servoj por gazo kaj ties uzado estas ĉiam pli plivestigataj ĉar ĝi kostas pli malkare.

La vendejoj estas je tipo “merkato”, sed ankaŭ “supermerkato”. Ĉi lastaj estas entute du ekde du jaroj sed oni ekspektas ke ties nombro plialtiĝu.

Kiel landon en konstruado sur la stratoj de Tirana oni rimarkas aŭtojn produktitaj ekde la jaroj 1995 ĝis la jaro 2005 sed ankaŭ grandajn konstruejajn kamionojn en la vojtrafiko. La vojtrafiko en Tirana estas troŝarĝita, kion pligravigas la mallarĝaj stratoj, sed ankaŭ la pasado de ŝarĝitaj aŭtiloj. Ekzistas ja trafiklumigiloj sur la nodaj punktoj de la urbo kiuj maleblas la blokiĝon kaj certigas la bonordon en ĝi. En Tirana la maksimuma rapideco per aŭto estas 40-60 km/horo kaj la akcidentoj estas malmultnombraj.

Klubejoj, restoracioj, oteloj

Klubejoj

Ekde la jaro 1990 ĝis nuntempe oni rimarkis novan fenomenon de la Tirana socio, tio estas la starigo de novaj klubejoj altirantaj ĉiam pli la publikon. Ili ja estas la ĉefa amuzigejo kaj moviĝfonto en la urbo. Nun la plimulto de la klubejoj aranĝas pli da originalaj amuzigmanieroj por ke kontentigu la homojn kaj estu ĉiam pli apude al la albana kulturo. Oni konstatas diversajn manierojn por la servado de la kafo, malgrandaj porcioj de alkoholo. La gajaj mienoj de la frekventuloj de kafejoj en la plej preferablaj lokoj ĉiutage montras la vizaĝon de la urbo. La kafo mem estas plej preferata trinkaĵo kaj ĝi kostas ½ eŭro dum la alkoholaĵoj kostas de 1- 100 eŭroj. La klubejoj de Tirana ofertas kulturalan kaj kvalitan servojn, same originalan kaj malmultekostan kompare al la similuloj en la najbaraj landoj kun Albanio kiel ekz. Skopje (Makedonio), Podgorica (Montenegro) aŭ Ateno (Grekio). Danke al la impostoj rikoltitaj de tiuj klubejoj oni faris multajn pliboniĝojn en infrastrukturo. Fakte ili konsideriĝas la plej profitdonaj aferismoj enspezigaj la urbodomon.

Restoracioj

Samtiel ankaŭ la restoracioj en Tirana estas konstruitaj ekde la jaro 1990 kaj estas parto de la vivo kaj samkiel la klubejoj ili estas faktoroj por la evoluo kaj plej bonaj gastigantojn de la fremduloj en Tirana. En ĉiuj restoracioj de Tirana, krom la kuiradoj je albana tradicio troveblas ankaŭ produktaĵoj de la greka, turka aŭ itala kuirartoj. La kuirado laŭ la loka tradicio estas tre pratempa sed dum la tempo ĝi estas interplektiĝinta kun la ceteraj mediteraneaj stiloj. Tamen loka proverbaĵo diras: Panon, salon kaj koron, kio signifas ke la kutimoj kaj moroj pri la gastigado hereditaj de albanoj fanatisme inkludas ankaŭ la kuirmanieron. La kostoj de la nutraĵoj servitaj en la restoracioj jenas: supoj- 1.5 eŭroj; manĝaĵoj – 2 eŭroj; viandaĵoj- 5 eŭroj, fiŝaĵoj- 5 eŭroj, dum la salatoj- 1 eŭroj, do ili estas relative malaltaj kaj samtempe forta indikilo por la klientoj kiuj volas ĝui ne nur la belajn ejojn sed ankaŭ la bongustajn lokajn kuiradojn.

Hoteloj

Laŭ plano de registaro por stadartizi la kondiĉojn kaj la prezojn en ĉiuj hoteloj en la tuta lando en la jaro 2006, oni ekspektas la pligrandiĝon de la nombro de la fremdaj turistoj samtiel ankaŭ de ordinaraj vizitantoj de la lando. Hoteloj, samkiel klubejoj kaj restoracioj estas parto de la vivo en urbe kaj servas laŭ la demandoj de la klientoj. Kutime la servo inkluzivas tranokton kaj la matenmanĝon kaj la taga kosto varias de 15- 20 eŭroj. La hoteloj en Tirana estas de diversaj kategorioj sed ni povas diferencigi ekz. Hotel Eŭropa Park Rogner, Hotel Sheraton, Hotel President, Hotel Tirana International kiel unuaklasaj, kiuj donis al Tirana ne nur pli dignan aspekton sed ankaŭ pli kvalitan servon.

Publikaj parkoj en Tirana

La publikaj parkoj de la centra areo de Tirana dum la jaroj de politika tranzicio kiun pasis la tuta Albanio submetiĝis al detruigo kaj ĝenerala amortiziĝo aŭ transformiĝis al aliaj objektoj, ekz. konstrugrundo aŭ konstruejoj. En la jaro 2000 oni laŭte proklamis per la moto: Ni redonu al Tirana ĉiun sian aspekton originalan kaj rekonstruu tion postrestintan. La urbodomo de Tirana kiel ĉefan organon kaj nunponun la plej severa kaj rigora rilate la mastrumadon, disvolviĝon kaj bonordon en la urbo konsideras la parkojn kiel plej bona spegulo kaj plej bona ripozujo por la loĝantoj.

Parko Rinia (Junularo)

Tiu ĉi parko troviĝas apud la centro de la urbo kontraŭ la legendeca hotelo Dajti kaj servas per ties verdeco kaj komfortaj kondiĉoj por gastigi la familianojn, maljunulojn kaj tiujn demandantaj malmulte da sereneco disde la bruego de la urbo. La klubejigo nomata Taivano troviĝanta en la koro de la parko ofertas same siajn ejojn harmonigante la verdecon kaj freŝecon alportata de plej granda enlanda akvofontano kun komforteco de ĝi mem. Parko Rinia estas konstruita en la jaro 1958, sed ĝi estis detruita en la jaro 1990 kaj rekonstruita en la jaro 2000, kaj ekde tiam ĝi estas la plej bona gastiganto de civitanoj.

Piramido kaj la parko antaŭ ĝi

Ekde la jaro 1992 kiam falis la komunisma sistemo kaj oni ne plu gardis la parkon antaŭ piramido komenciĝis nova vivo en Tirana. Tien iras ĉiutage familianoj el ĉiuj kvartaloj de

la urbo kaj ĝuas side la majestecon de moderna albana piramido. La urbodomo estas disponiginta je la servo de civitanoj multajn amuzigilojn, nelaste ankaŭ projekciadon de filmoj dumsomere.

Parko por infanoj “<Borbardha dhe 7 xhuxhat> (Blankneĝulino kaj la sep nanoj)

Ĝi estas ne nur bela parko kun multaj ejoj sed ankaŭ kiun sopiras ĉiu infano kiu eĉ unu fojo ekĝuis ties belaĵojn kaj miraklaĵojn. La parko portas familian karakteron, tial tie okulfrapas precipe infanoj akompanataj de parencoj. La parko ekzistas ekde kvin jaroj. La enirejo en ĝin kostas malmulte. Ankaŭ tiu parkon trafis la damaĝoj pasinttempe, dum la jaroj de politika tranzicio.

Bar-Florĝardeno 1 Maj

Tiu ĉi loko samkiel la ceteraj atendas ĉiutage familianojn kaj infanojn kiuj povas ludi en ĝi, sed ĉiutagaj frekventuloj estas la aĝuloj aŭ pensiuloj, kiuj povas amuziĝi ludante per hazardludo, ŝakludo aŭ damludo en apartaj lokoj en ĝi. Post la kompleta detruigo la parko rekonstruiĝis en la jaro 2000. Ĝi reprezentas la novan tajdon de rekonstruadoj en urbe fierigantaj kaj plibeligantaj tiun lastan. La parko troviĝas tuj apude al la albana parlamentejo kaj la domo de politikaj persekvitoj fare de komunisma reĝimo de Albanio. La arkitekturo ĉirkaŭe estas tre alloga.

Karaktero de loĝantoj, vivo kaj ties standardo

La vivo en Tirana surbaze de faktoj konstatitaj lastajn jarojn en Albanio kiel : elmigrado, politika tranzicio aŭ totala detruigo de armeo pro civila milito estas sufiĉe trankvila kaj bela. Ĉiu homo kontentiĝas pro la laboro kaj socio. Lastatempe oni rimarkis somerajn lernejojn, lernokursejojn por fremdaj lingvoj, kaj amuzejojn per la lastaj teknikaĵoj de elektroniko aŭ interreto. Tio montras klare ne nur la disvolviĝon de infrastrukturo sed ankaŭ de la homoj mem el kiuj plejparto de gejunuloj scipovas fremdlingvojn. (laŭ iu opinio 100 % parolas unu fremdan dum 80 % du fremdajn lingvojn). La politiko estas la plej preferata scienco de albanoj, kaj la tagaj disputoj koncentriĝas ne nur pri la aktuala sed ankaŭ pri la pasinta politiko, same pri futuro. La lasta politiko sekvata de de landaj gvidantoj estas influantaj notinde en la proceso de elmigrado de albanoj eksterlanden, en malfermiĝon de novaj laborpostenoj, en rekapabliĝon de homoj kun sociaj, religiaj aŭ regionalismaj problemoj kio indikas ankaŭ ian nivelon de stadarto proksiman al homoj en aliaj landoj. Komunismo en Albanio ne nur malpermesis aŭ cenzurigis la religion kaj scion sed endoktrinigis ĉe homoj ideologion postlasinta ĝis nuntempe siajn spurojn, kiel

estas ekz. la kutimo por detrui familion je intereso de partio komunisma, akompanata de aliaj fiaj malvirtoj kiujn nia publika opinio hodiaŭ kondamnas senkompatate. Hodiaŭ religio kaj sciigo floriĝas senprobleme. Ankaŭ la krimo ene de familio estas malpliiganta, sed la uzado de narkotaĵoj prezentas fenomenon danĝeran por la socio. La polico en Tirana kaj en tuta Albanio post kelkaj specialaj trejniĝoj fare de internaciaj kolegoj estas manifestaciante ĉiam pli aŭtoritatecon, maturecon kaj alertecon, kvalitoj necesaj por la ties laborantoj. La virino en patriarkala sistemo heredita en Albanio hodiaŭ sin sentas pli libera kaj ne tiom malbontraktita. Ŝi rajtas eĉ gvidi instituciojn diversajn, samtempe ŝi estas tre fanatika por protekti la dignecon de sia familio. Ekzistas kelkaj registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj sin okupantaj per problemoj de virinoj, kiaj estas enposteniĝo, dungigo ks. Ĉe ni la virinoj neniam manifestacias surtrate je signo de protesto por siaj rajtoj kaj ili fieras ke Patrino Tereza granda bonfaranto estas albana. Kiel dirite supre familio estas sanktejo por albana virino, kiu estas bona dommastrino kaj infanvartistino kaj edukisto. La Konstitucio de Albanio entenas apartajn nenojn por protekti familion kaj ties bonordigado. En Tirana familioj oni rimarkas agrokulturajn manierojn de la kuirado kie oni preferas enlandajn produktaĵojn kompare al fremdaj, kiel estas pano, viando, rakio (brando) harmoniigitaj kun la gastamo karakteriza. Virinoj estas forta faktoro por pluteni vivajn kaj viglajn la tradiciojn kaj bonan morojn.

Kultoj de la civitana kulturo

Nacia galerio de artoj

Ĝi estas fondita en la jaro 1954, sed en la jaro 1974 la sidejo translokiĝis tien kie ĝi estas nun, en nova moderna domo projektita kaj konstruita kile kulturalan kulton je samtempaj parametroj. Galerio estas la plej grava institucio de viziaj artoj enlande. Tie konserviĝas la nacia kolekcio de viziaj artoj, komencante ekde la dua duono de XIX jarcento ĝis nuntempe. Tiu kolekcio konsistas el verkaĵoj de periodo de nacia renesanco kaj sendependeco (1883-1944). En galerio estas ankaŭ kolekcio de ikonoj apartenantantaj al XIII-XIX jarcentoj, same la plej granda kolekcio estas tiu de periodo de komunismo kiel estas pentraĵoj kaj skulptaĵoj (1944-1990); pavilono de fremdaj artoj kaj tiu de samtempaj albanaj verkistoj. En la subtera etaĝo oni aranĝas portempajn ekspoziciojn de la lokaj aŭtoroj kaj fremdaj. Kelkaj el ĉiujaraj ekspozicioj organizataj estas la internacia konkurso de arta fotografio (Marubi), internacia konkurso de viziaj artoj (Onufri) kaj ĉiun duan jaron organiziĝas la plej granda artisma evento, la Bienalo de Tirana. Same oni promocias artistojn, grupojn aŭ artismajn asociojn el la lando kaj la mondo. En la ĉefa salono aŭ sur la unua etaĝo oni prezentas verkaĵojn el la nacia fonduso dividitaj kaj kategoriigitaj laŭ la graveco kaj historiaj kaj artismaj periodoj. Tiaj estas ne malmulte sed 4000 verkaĵoj de diversaj aŭtoroj el ĉiuj regionoj de la lando.

Nacia Muzeo

La nacia historia tradicia muzeo estas kultura kulto konstruita pro bezono de tiel nomata socialisma realismo por montri al la popolo kaj al la alvenintoj kiel vizitantojn la historion de la lando, la potencialon, kulturon, metiojn kaj teknologiojn primitivan ĝis la evoluo de nuntempo. La muzeo estas konstruita en la jaro 1981 kaj en sia interno troviĝas partoj de pasinta vivo kaj montriĝas la karaktero de ĉio je materia maniero, sed ne humana kiel ekz. Tolaĵoj, lignolaboraĵoj, arkitekturaj stiloj, vestoj por viroj kaj virinoj el ĉiuj regionoj, moneroj kaj objektoj el antikva mondo, spuroj kaj fosiloj ĝis al la produktaĵoj de nuntempo. La muzeo estas kultura kulto kie ne nur la lokanoj sed ankaŭ la fremduloj venas por viziti ĝin. La mozaiko ĉe la frunto de muzeo nomiĝas Albanio kaj estas farita el malgrandaj ŝtonoj multkoloraj montranta la evoluigon de la albana vivo de sistemo al sistemo

Teatro de opero kaj baletto

Ĝi komenciĝis konstrui en la jaro 1959 helpe de sovetia registaro kaj en la stariĝo de fundamentoj partoprenis ankaŭ la eksa unua sekretario de Komunista Partio de Sovetunio, Nikita Ĥruŝev, kiu surmetis la unuan brikon. Sed pro politika provokacio farita de sovetia registaro la interrilatoj malboniĝis kaj la domon devis plukonstrui mem la albana registaro, helpe ankaŭ de ĉina ŝtato. Tiel la domo finiĝis en la jaro 1966. En tiu ĉi kultura kulto okazas koncertoj kaj diversaj manifestaciaĵoj je akcentita nacia karaktero kaj multaj televiziaj spektakloj, kiuj plue kontribuis ke tiu kulto konservu sian lokan karakteron. La haloj kaj la ejoj de la palaco estas disponeblaj al fremdaj kanzonistoj alvenantaj e Tirana-n por plenumi siajn artismajn turnirojn en balkanajn landojn.

Konkludo pri la urbo de Tirana

Tirana estas metropolo de lando en disvolviĝo kia estas Albanio kaj ĝi klopodas integriĝi al la globala ordo. Ĝi estas paŝante sur la ĝusta vojo sed la vojaĝo estas longa. Tamen la homoj, aparte ties gvidantoj devas kuraĝiĝi ĉiutage same devas kontroliĝi je kvalito de ilia laboro por ke la publiko ekĝui ĉiukaze la eŭropan futuron alproksimiĝanta al Albanio.

Konkludo kaj la civitana bezono evidentigita de tiu ĉi plano

Tiu ĉi plano temas pri la urbo de Tirana, ties turisma disvolviĝo kaj potencialo kaj pri la eblecoj al la vojo de ia metropolo kiu estas ĉiam plilarĝiĝanta danke al la problemoj kaj kompletigitaj faktoroj donantaj al la urbo kaj la homoj vivkoloron kiu havas ekde sia

komenciĝo dum antikveco. Tiu ĉi plano evidentigas plej valoraj historie lokojn kiuj estas indikiloj pri tio kio estas ja Tiranaoj kiuj aprecas kaj sentas sin honorigitaj per mem la nomo de civitano de Tirana kaj estas pretaj fariĝi honestaj agitistoj por sia lando surbaze de tutnacia intereso.

Ni estas skribinta je tiu ĉi plano pri la tuta turisma potencialo aŭ kremo de tiu potencialo por evidenti ankoraŭfoje en patriota maniero la valorojn de nova metropolo iranta per gigandaj paŝoj al aŭropeca moderna vivo. Ne nur tiom, se ni trafolumas nian historion, krom multnombraj malamikoj de nia lando krom la okupado mem estas rikoltintaj laŭ napoleona maniero la materiajn kajhomecajn bonojn dum longaj jaroj, sed danke al la monisma sistemo oni sukcesis restarigi la dignecon kaj certigi la konstruiĝon de la lando, sed malbonŝance eĉ tiu ĉi lasta transformiĝis en sistemon kies ĉefa celo estis la personaj interesoj de la albana diktatoro Enver Hoxha (Hodĵa). Poste sekvis la detruaĵoj akompanintaj la periodon de tranzicio.

Nun nova moto ekde la jaro 2000 “nia vizaĝo returniĝu al la vivo enlande” igas Tirana-n samkile la tutan Albanion kapabla bonvenigi amikojn-turistojn kaj montri al ili ke la monda historio jam pasis ankaŭ ĉi tien. Tirana estas la plej nova metropolo evidentigita en la tuta nia regiono kaj malnova kontinento mem kaj ĉiun tagon ĝi klopodas ke tiu kontinento returniĝi sian vizaĝon ankaŭ al ĝi, eĉ eksenti la subtenon kaj apogon farendan de tiu kontinento por la bezonoj kiujn la albana socio ne povas elteni sola. La gastamo de la Tirana manĝotablo estos sendube la ĉefa faktoro konsistiganta la veran vizaĝon de la vivo en tiu ĉi urbo.

Bibliografio

Historio de Albanio

Prof. Dr. Myzafer Korkuti , Prof. Dr, Petrika Thengjilli , Prof. Dr. Gazmend Shpuza ,
Prof. i as. Dr. Fatmira Rana , Prof . i as. Dr . Xhelal Gjeçovi , Prof. i as. Dr. Dilaver
Sadikaj

Arvanitoj kaj la deveno de grekoj

Av. Prof. Aristidh P. Kola

Gjeografio de Albanio

Prof.Dr. Vasil Naço , Dr. Eqerem Yezeiri

Gvidlibro de la distrikto de Tirana

Prof.Dr. Kristo Frasheri

Historio kaj la kulturo de Tirana

Arlind Nikollari

www.shqiperia.com

www.google.com

Legindaĵoj el aziaj samideanoj

NENIAM plu Hiro.imo! NENIAM plu Nagasako!

(Sesdek jarojn post la unuaj atombomboj)

*Mesago de la urbestro de Hirosimo sendita pere de
Esperanto kiel ponto-lingvo*

Memorigo antaŭ la kradpordoj de la USAF-bazo en Aviano (*ndr: en regiono Friulo-Julvenetio, apud Pordenone*) – kunlige kun iniciatoj samtempe okazantaj en Belgio, Germanio, Britio, Usono kaj aliloke – konkludis marde la 9^{an} de aŭgusto vicon da manifestacioj, kiujn asocio *BEATI I COSTRUTTORI DI PACE* (Feliciaj estu la packonstruantoj) kunordigis je la 60^a datreveno de la surjetado sur Japanion de atombomboj.

Post memorigo de la unua atomatako detruinta Hirosimon, sabate la 6^{an} de aŭgusto, je la 8.15 h matene, antaŭ la armea flughaveno en Ghedi (Brescia), posttagmeze en Padovo, estis inaugurita signifoplena fotoekspozicio: “Neniam plu Hirosimo! Neniam plu Nagasako!” La sekvan tagon, posttagmeze, sub la Logio de Granduloj, okazis komuna prego por paco kaj kontraŭ nukleaj armiloj fare de malsamaj religiaj konfesioj kun legado de la prego PATRO NIA ankaŭ en esperanta versio, dum s-ino IKEDO Seika la ceestantojn kortusis per sia emociveka atesto de “hubaksa” t.e. la postvivinto de la nuklea eksplodo.

Fokuspunkto estis la tuttaga kunveno “For la atomarmilojn!”, okazinta lunde, la 8^{an} de aŭgusto ce salono *Paladin* de Palaco *Moroni*, kun elstaraj intervenoj de sciencistoj, parlamentanoj kaj aliaj gravaj aŭtoritatuloj. Ciuj eventoj enkadrigis en la “Kampanjo Tutmonda por Forigo de Nukleaj Armiloj”, kiun iniciatis la Urbestro de Hirosimo, AKIBA Yadoshi. Lia alcela salutmesago – lautlegita al la ceestantaro – sendis al la itala grupo ESPERANTO SOCIA FORUMO la esperantistoj de Hirosimo, kiuj utiligis kiel ponto-lingvo Esperanton, neutralan kaj egalecan idiomon, do, tute respondan kaj oportunan en tiu ci cirkonstanco.

Jen la teksto de l' mesago:

Al “6-9 DE AUGUSTO: NENIAM PLU HIROSIMO!

NENIAM PLU NAGASAKO!” 2005.08.06 – AKIBA Tadatoshi, Urbestro de Hiroshima, Japanio
““ Okaze de ci tiuj kunvenoj, mi sendas mesagon al vi. Sur prapunkto de sperto atombombita antaŭ 60 jaroj, Hiroshima daŭre apelaciadas nuligi nukleajn armilojn kaj realigi eternan mondpacon. Sed, ceno de malamo, perforto kaj vengo en diversaj lokoj en la mondo restas ne interrompita, kaj ankoraŭ nun ekzistas multenombraj nukleaj armiloj sur la terglobo, ĉe kreskas ebleco de uzo de nukleaj armiloj. Elkore mi petas al vi, ke ankaŭ de nun memoro de Hiroshima restu en via koro, kaj kune kun ni strebu kaj agadu por realigo de la mondo sen nukleaj armiloj, por la mondo emancipita de malamo kaj teruro. Laste, mi pregas sukceson de la cenaj kunvenoj, kaj sanon de vi ĉiuj partoprenantoj. ””
Esperanto, lingvo de interkompreno kaj paco, ankoraŭfoje ludis gravan rolon kiel peranto de sentemaj vortoj, okaze de signifoplena evento.

Por amantoj de kuirarto

PREPARADO

Metu la semolon en grandan pelvon kaj surversu ĝin per la bolanta akvo. Miksu kaj lasu ĝin ripozi ĝis ties pufigo (ĉirkaŭ 15-30 minutojn). Aparte haketu la cepojn, la sensemigitan kukumon, petroselon kaj mentofoliojn. Senigu je semoj kaj suko la du tomatojn kaj ilin haketu. Senakvigu la semolon, ĝin elpremante. Kondimentu ĝin per la herboj, cepoj, kukumo, tomatoj, lemonsuko, plus 2 kulerplenoj da oleo, salo kaj pipro. En telero miksu kuminon kun salo kaj pipro kaj per tiu miksado frotu ambaŭflanke la trancaĵojn de tinuso. Ilin per unu kulerpleno da oleo kuirpreparu sangorice, poste dishaku kaj miksu ĉion kun tabuleo.

Surtabligu la mangajon fresa. * Speco de malfajna semolo vaporkuirita. (PIV, 643, 1)

150 gr da kuskuso 300 ml da bolanta akvo 2 rugaj cepoj 1 kukumo 2 tomatoj 1 granda garbo da petroselo 1 garbeto da mentofolioj 1 ½ kulereto da muelita kumino 4 malgrandaj trancaĵoj de fresa tinuso 3 kulerplenoj da olivoleo 2 kulerplenoj da lemonsuko salo kaj pipro

El la leteroj

Mi bone revenis al Francio. Tamen pro pluvego mi survoje dormis en cxambro en Kroatio kaj en Italio. Benzino ĉie plikostigxis, ankaŭ hodiaŭ, kvankam mondo kurso malaltigxis. Mi venontsemajne fotokopios mian artikolon en la lernejo kaj sendos ĝin al Shaban. Mi ankaŭ baldaŭ surdiskedigis miajn fotojn pri via lando en 1981 kaj sendos diskedon al Shaban. Mi trovis libron el 1970 de franca stalinisto, kiu ridigas min "Albanio tero de la nova homo",. Mi sendis albumon de fotoj de Fratoj Marubi el Shodër al Shaban, sed ne diris al li tio estas surprizo. Cetere mia bildkarto el via lando ankoraŭ ne alvenis.

Amike Robert Pontnau